

# Seleco 2013

Kiel sciante, de antaŭ kelkaj jaroj, la numeroj de **Seleco**, la presorgano de **Astura Esperanta Asocio**, estas kvazaŭ monografiaj, tio estas, plejparto el ĝia enhavo estas dediĉita al specifa temo. Ekzemple, la numero eldonita en la jaro 2011 havis kiel ĉeftemon la nunan ekonomian krizon, ties kaŭzojn kaj antaŭaĵojn. Pasintjare ni eldonis du numerojn de la revuo, ambaŭ dediĉitaj al la historio de la du jarcentoj de la hispana konstituciismo, por festi la duan centjaron de la konstitucio de 1812.

Nu, la revua numero kiun ni estas preparante nun, celas rememori aliajn datrevenojn. La jaro 2013 estas la 50-jariĝo de la komenciĝo de la 2a Ekumena Koncilio de la RomKatolika Eklezio. Krome, ĉi-jare estas ankaŭ la 1700 datreveno de la t. n. "Edikto de Milano", tio estas, la dekreto de la romia imperiestro Konstantino, per kiu oni metis finon al la persekutado de la kristanoj kaj malfermis eraon de disvolviĝo kaj potenciĝo de la Eklezio en Okcidento. Se al tio ni aldonas ke ĉi-jare okazis demisio de la katolika Papo kaj estas elekto de nova Pontifiko, tio pravigas ke ni iome pritemu la multjarcentan historion de tiu Eklezio, ĉi-ties konciliojn kaj problemaron. Ni esperas ke proksimume je la fino de la jaro la 89a numero de **Seleco** estos preta.

# Seleco



Pres-organo de:  
Astura Esperanta Asocio



Numero 89

Novembro 2013



**Ekleziaj  
koncilioj**



**50-jara jubileo de la  
2a Vatikana Koncilio**

Arturo  
PÉREZ-REVERTE

**LA KAPITANO**

**ALATRISTO**

Scenaro de  
Carlos Giménez

Desegnaĵoj de  
Joan Mundet

EDB



## NIAJ ELDONOJ

Inter la taskoj entreprenitaj ĝis nun de nia esperantista asocio, la verko-eldonado, ja, ne estis kiu pli da atento ricevis. Fakte, temante pri eldono de libroj ni povas menciigi nur tiun de la jaro 1987, kiam ni, por festi la Centjaron de Esperanto, publikigis la libron **ASTURA BUKEDO**.

De nun ni intencas esti pli aktivaj en tiu labor-fronto de la libro-eldonado, kaj ni jam entreprenis ion tiurilate. Lasttempe ni esperantigis la unuan numeron de iu komikso-kolekto. Temas pri la famkonata verko "La kapitano **ALATRISTO**" de Arturo Pérez Reverte.

Oni devas precizigi ke la tradukaĵo estas finpreta sed ĝi ankoraŭ ne estis eldonita ĉar por tion fari estas necesaj la koncernaj rajtigiloj de la aŭtoro de la verko, la desegnisto de la komikso, la eldonisto... Ni devas plenumi ĉiujn necesajn demarŝojn kaj se la afero sukcesos, la Kapitano Alatrismo aldoniĝos al la havaĵo de la esperantlinga literaturo.

Krom tio ni prikonsideras la eblecon disvolvi pluan tiutipan laboron.